B o l a n t a K a l d r o n o

INFORMILO 282
de la Esperanto –Grupo Bremen
januaro – marto 2007

Prezidanto: OstR i.R. Hellmut Grebe, Tel: 0421 396 34 80 **hellmut.grebe@web.de**
Sekretario: D-ro Hans-Walter Krüger, Dordrechter Str. 36, 28259 Bremen,
Tel: 0421 56 19 43.
Kasistino: Ruth Bohn Tel: 0421 13 82 715
Red. Dieter Hartig, August-Hagedorn-Allee 55, 28279 Bremen



Mi verkis la Informilon de la Bremena Grupo de 1975 ĝis 2006.
Entute 282 eldonojn en 31 jaroj.
La plumo nun gratas kaj skrapas, ĝi estas eluzita.
Daŭrigos certe iu nova plumo per pli eleganta maniero.
Flankeniĝis tial via Dieter Hartig



Benitan Kristnaskon
kaj agrablajn festotagojn
al niaj gemembroj kaj niaj geamikoj.

Ni deziras por 2007 sanon, feliĉon
kaj pacon en la mondo.
Por nia grupo kaj movado bonan progreson.

Nia nova kunvenejo: **Waller Heerstr 58**. Atentu pri la granda indiko sur la montrofenestro: "**HOKI 58**"! Per tio ni mencios ankaŭ, kie la anoncita programo okazos.

(Aŭtoparki eblas ankaŭ ĉe la "Kino 46")

Nia Programo: Atentu la programon en nia Informilo 281

10an de januaro En HOKI 58

Ni bonvenigas la Novan Jaron

Ĉiu el ni esprimu siajn dezirojn kaj esperojn

14an de februaro **Unsere Jahresversammlung**

Tagesordnug: En HOKI 58

1. Begrüßung
2. Wahl des Protokollführers und Wahlleiters
3. Bericht des Schriftführers
4. Bericht der Kassiererin
5. Bericht der Revisoren
6. Entlastung des Vorstandes
7. Entlastung der Kassiererin
8. Neuwahl des Schriftführers
9. Neuwahl des Informilo - Redakteurs
10. Wahl des Vorstandes und der Revizoren
11. Verschiedenes (Werbung, Programmgestaltung)

Anträge und Änderungen bis zum 1. Februar an Hellmut Grebe

Tel. 3 96 34 80

Retrospegulo

Grupvespero la 13an de oktobro estis la lasta fojo antaŭ nia jubileo

La ununura temo estis nia jubileo. Bedaŭrinde kelkaj membroj ne povis partopreni, ĉar ili feriis ekster Bremen.

La plej multaj aferoj ja estas bone aranĝitaj, sed estas tamen ankoraŭ io kaj tio farenda. La jubileaj presaĵoj ja estas pretaj kaj atendas la kopiadon. Tial ni decidis ankoraŭ foje kunveni por precize disdoni la diversajn taskojn kaj, ĉefe, fiksi la kuradon de nia entrepreno.

Ni ĉiuj estas konvinkitaj, ke la organizadon bone kuŝas en la manoj de nia gvidanto Hellmut Grebe.

Post kiam ni traktis laŭ nia opinio ĉiujn temojn, ni adiaŭdis kun danko al Hellmut pri sia bona, ĝisnuna preparlaboro. Hg

100 jaroj Esperanto – Grupo Bremen

Sub la gvido de nia prezidanto Hellmut Grebe ni preparis kaj okazigis nian 100-an jubileon. Per sia maniero li trankvile, por iu kaj tiu tro trankvila, sed celtrafe aranĝis unu programpunkton post la alia.
Mi, ekzemple, preparis la festkajeron kaj la invitilon kaj aliajn necesajn presaĵojn. Li vizitis min kaj korektis ĉion laŭ siaj intencoj.
Preskaŭ ĉiuj membroj kunagis aranĝi la programon kaj poste, dum la festo, ĉiu kunagis, por ke ĉio bone sukcesu.
La junulargastejo estis bonega loko por niaj celoj. La salonoj estis sufiĉe grandaj kaj plenumis niajn intencojn. Niaj nederlandaj geamikoj kaj aliaj partoprenantoj povis loĝi en la junulargastejo. Ni aŭdis, ke la ĉambroj estis sufiĉe komfortaj.
La unua renkontloko estis nia grupkunvenejo HOKI. Laŭ la priskriboj, ĉiuj trovis facile tiun lokon. Fine ĝi estis plenplena. Al niaj gastoj ni ofertis buterpanojn kaj trinkaĵojn, kio ĉiuj volonte akceptis.
Ĝustatempe ni veturis per tramo al nia festkunvenejo, la junulargastejo. Jen ni unue komune tagmanĝis. Multaj partoprenantoj festis revidon aŭ interkonatiĝis per hazarda vido.
Sekvis mallonga promenado laŭlonge de la Weser-rivero kaj tra la koro de nia urbo, la Böttcherstrato kaj foiro, ni reiris akurate por partopreni al la festkunveno.
En la festsalono ni renkontiĝis. Hellmut bonvenigis la ĉeestantojn kaj prelegis pri nia grupo, pri esperanto kaj ties signifo por la homoj. Tiu prelego estis tre informativa ne nur por kelkaj gastoj, sed precipe por la jurnalistoj, kiuj registis la prelegon kaj eĉ poste aŭdigis ĝin en radioelsendoj. Mi devas konfesi, ke ankaŭ mi estis kaptita per lia lerta prezentajo.
Kelkaj el niaj gastoj transdonis salutojn kaj bondezirojn kaj donacojn. Niaj geamikoj el la Esperanto-grupo Unterweser transdonis belaspektan skribtabulon, per ĝi ni bone povas publikigi informojn. Niaj nederlandaj geamikoj donacis al ni beletan foto-albumon por la fotoj pri nia jubileo. Tiun ideon oni aplaŭde akceptis same kiel la aliaj prezentaĵoj. Precipe la eksterlandaj gastoj imponis per la esperanto-parolado. Estis la nederlanda reprezentanto kaj tiu el Slovakio. Ankaŭ el la germanaj gastoj bondeziris nian grupon per afablaj vortoj.
Kafotrinka paŭzo kaj prezentado de nia montrotabuloj kaj de la montrindaj libroj el nia bibloteko. Ni lasis al la partoprenantoj tempon interbabili.
Hellmut legis el nia libreto “La bremenaj urbmuzikistoj” en kiu estis la fabelo tre ĉarme per versoj verkita. Aplaŭde la aŭskultantoj dankis tiun prezentaĵon.
Jam je la 18a oni vokis al vespermanĝo al kiu sekvis la festvespero. Jam instalis sin la grupo KAJTO el Nederlando. Ili kantis ĉefe en esperanto kaj nur kelkaj kantoj en la frisa, la hejmlando de la mizistoj. La gastoj, intertempe alvenis interesitoj, allogitaj per la gazetinformoj, ege ĝuis la prezentaĵojn. Malfrue finis la bela tago per adiaŭaj vortoj de nia prezidanto Hellmut Grebe.
Dankon al ĉiuj, kiuj kunlaboris kaj per tio ebligis la feston de nia 100-jariĝo de nia grupo.

Dimanĉomatenon la ankoraŭ partopenantoj kunvenis antaŭ la Transmara Muzeo. Ni ofertis du progamerojn: aŭ partopreni al urbrondirado, aŭ al la gvidado tra la azia ekspozicio en la muzeo.

La unuan grupon gvidis Ruth Bohn. Ŝi montris kaj klarigis la interesajn vidindaĵojn de nia urbo. Bremen estas vere belega kaj vidinda urbo. Estas plezura prezenti ĝin.
Hellmut gvidis la alian grupon tra la muzeo kaj klarigis tie la interesajn eksponaĵojn. Evidente, ankaŭ tiu grupo travivis interesan matenon.
En la muzea gastejo la partoprenantoj de nia jubilea festo kunvenis por komune tagmanĝi.
Nia prezidanto Hellmut Grebe dankis la gastojn por ilia ĉeesto kaj deziris bonan hejmenvojon.
Ĝis revido.

Dieter Hartig

La Esperanto-urbo Herzberg

Komence de oktobro mia Lisa kaj mi kongresis en Herzberg. Temis pri nia jarkunveno. Ni alvenis kelkajn tagojn pli frue por rigardi la lokojn en la Harzmontaro, kie ni iam feriis. Ni vizitis ankaŭ la belan urbon Herzberg kaj kun ĝojo rigardis la vojmontrilojn en Esperanto. Per ili ni atingis la ICH, la Interkulturan Centron Herzberg.
En la centro ni estis tre kore bonvenitaj de Peter Silva, kun kiu ni estas jam de longe amike konataj. Li gvidis nin tra ka centro. En ĉiu etaĝo agis junaj homoj per komputiloj kaj alij iloj. La lingvo estis kompreneble Esperanto kaj ĉiuj severe laboras. La kunlaborantoj venis el diversaj nacioj. Jen la fonto de la unika sukceso.
Oni montris al ni la riĉenhavan bibliotekon, en kiu ni vidis ankaŭ kolektita nian « Bolantan Kaldronon ».
Ni renkontis Peter kelkfoje, ĉiam en senlaca aktiveco. Li organizis pedagogiajn tagojn, en kiuj oni esploris, kiel uzi kaj utiligi la plej novajn înstruilojn. La vicurbestro transdonis la atestilojn pri kursfina ekzamenoj al ok partoprenantoj.
En la kavalira salono de la kastelo Herzberg okazis la nova ekspozicio.Ni ĉiuj deziras al tiu Esperanto-Urbo kaj la Esperanto-Centro bonan sukceson kaj progreson. Ni esperas, ke tiu ekzemplo radios en la mondon.

Dieter Hartig

Lasta alineo..

Sendube, vi konstatis, ke mi verkis la Informilon kun ĝojo kaj celis progresigi Esperanton en Bremen. La desegnaĵoj ilustris la legaĵon kaj plezurigis vin.
Lastatempe mi diris plurfoje al vi, ke la redaktado penigas min post pli ol 30 jara eldono. Mi laciĝas kaj mia sanstato malhelpis la laboron per komputilo. Mia kuracisto severe konsilis, ne plu labori per komputilo, ĉar tio estas la kulpo, ke mia konstanta doloro en la ŝultro.
La kolektitaj Informiloj plenigas grandegan aktujon apenaŭ porteblan. Tio malkovras la amplekson de la farita laboro en pli ol 30 jaroj.
Sufiĉas!
Tial mi adiaŭas kiel redaktoro kaj deziras resti fidela membro en nia Esperanto-Grupo Bremen. Mian posteulon mi deziras ĝojon kaj sukceson en la eldono de nia tradicia Informilo.

Via Dieter Hartig